
# Amerika Esperantisto

MARCH 1917



The Liberty Bell rang out its glad message in July. Also in July [coming] will be held the Tenth Congress of American Esperantists.

*Come to Philadelphia!*

# AMERIKA ESPERANTISTO

Official Organ

of

## THE ESPERANTO ASSOCIATION OF NORTH AMERICA, Inc.

a propaganda organization for the furtherance of the study and use of the International Auxiliary Language, Esperanto

---

## CLUB DIRECTORY

This department is conducted solely for the benefit of our organized groups throughout the country. It furnishes a means of keeping in close touch with the work in other cities, for the exchange of ideas and helpful suggestions, and for the formation of valuable friendships in a united field of endeavor. Groups are listed for 12 issues of the magazine, at a cost of only 25 cents for the two-line insertion. Extra lines are 10 cents each additional. The heading,—name of city or town—is inserted free. This matter warrants the immediate attention of every club secretary.

BERKELEY, CALIF.
Berkeleya Esperanta Rondo,—Classes Monday and Tuesday evenings at 8.00.—Meetings Wednesday evenings.. Address H. S. Lane, Sec'y, 1323 Oxford St.

OAKLAND, CALIF.
Oakland Esperanta-Rondo; L. D. Stockton, Sec. & Treas., 436 15th St.

BOSTON, MASS.
Boston Esp. Soc., 402 Pierce Bldg., Copley Sq. Meets Tues., 8 P. M. R. Goodland, Sec.

BUTTE, MONT.
Arĝentarka Esp. Rondo, kunvenas vendrede, 8.00 P. M. C. L. Williams, Sek., 311 E. Mercury St.

CHICAGO, ILLS.
**La Gradata Esperanto-Societo, Dvorak Park Fr. Kovarik, 2502 S. Kedzie Ave., Sek.**
**La Esp. Oficejo, 1669 Blue Island ave.**
**F-ino R. Votlučka, 1539 W. Jackson Blv. Sek. Kunvenas 2an kaj 4an sab. ĉiumonate.**

CINCINNATI, OHIO.
Cincinnati Esperanto Soc., 629 Vine Street. E. H. Becker, Sec., 511 Sycamore St.

DELPHOS, OHIO.
Delphos Esperanto Klubo, Carnegie Library; Meets every Tuesday, 7.30 P. M., A. J. Laudick, Secy.

CLEVELAND, OHIO.
La Zamenhofa Klubo; S. Kozminski, Sek., 3913 Sackett Ave.

DETROIT, MICH.
Detroit Esperanto Office, 507 Breitmeyer Bldg., open daily. Library at disposal of everybody, daily 7 A. M.-9 P. M., except Tues. and Fri. Classes meet Tues. and Fri., 8-10 P. M.
La Pola Esp. Unuiĝo, ĉiusemajne, Magnus Butzel Library, Harper & E. Grand Blvd.
La Septentrio, Tues., 8.00 P. M., 578 Alexandrine ave., W.

HOUSTON, TEXAS.
Houston Esperanto Rondo, ĉiun mardon, 8.00 P. M., ĉe Y. M. C. A. S-ro A. F. Sundermeyer, Sek.

MILWAUKEE, WISC.
Hesperus Esperantists, S-ino B. H. Kerner, Sek., 632 Summit ave., 3rd Tuesdays, 8 P. M.

NEW YORK, N. Y.
Greater New York Esperanto Society.
C. C. Coigne, Sec'y, 2633 Creston Ave.
Tel. Fordham 2749.

NEW YORK (Manhattan) N. Y.
The New York Group, Wash. Irvng H. S. Jos. Silbernik, Sec., 235 E. 18th St.

NEW YORK (Manhattan) N. Y.
Germana Esperanto-Societo, 1966 Broadway, Rm. 27...Open every Wed. for information 7-8 P.M.; Meetings and classes, 8-9.30 P.M.

PHILADELPHIA, PA.
Phila Esp. Soc., J. F. Knowlan, Sec., 45 No. 13th St. Meets 4th Fri., Windsor Cafe, 1217 Filbert St.

PHILADELPHIA, PA.
Rondeto de Litovo-Polaj Esperantistoj, 2833 Livingston St.

PITTSBURGH, PA.
Esperanto Sec., Academy of Science and Art Wm. Smith, Sec., 7315 Greenwood St. Fridays, 8 P. M.,Teachers' Rm., Carnegie Inst.

PORTLAND, ME.
Portland Esperanto Society, Trelawny Bldg.. Mrs. Wm. C. Tapley, Sec'y, 13 East Promenade.

ROCKFORD, ILLS.
**Skandinava Esperanto-Instituto, 417 7th St. Joseph Johnson, Sec'y, 2315 Parmele St.**

SALT LAKE CITY, UTAH.
Salt Lake Esperanto Club,
Mrs. F. M. McHugh, Sec., 4002 So. State St.

SAN FRANCISCO, CALIF.
San Francisco Rondo, meets Friday eve., Rm. 127, Lick Bldg., 35 Montgomery St., F-ino M. D. Van Sloun, Sec'y, 946 Central Ave.

TILDEN, NEBR.
Esperanto-Fako de la Nebraska Ŝtata Kristana Celada Unuiĝo,
Estro, Pastro Chas. P. Lang, Tilden, Nebr.

WORCESTER, MASS.
Worcester County Esperanto Society
Business Institute, every Friday, 8.00 P. M.

# Abridged Catalog

Following is an abridged list of the books we have for sale. These books are on hand at the time this list is issued, and by always ordering from the latest list you will be fairly sure that your order can be filled as sent. Additions will be made to the list each month, until practically our full line is represented, and those out of stock and not immediatey obtainable will be deleted from the list. Remember, then—always order from the latest list.

The following books, etc., are carried in stock in quantities and may usually be had without delay.

### TEXT-BOOKS AND DICTIONARIES

Bound in paper unless otherwise specified

Complete Grammar of Esperanto (Kellerman) cloth ........ $1.25
Practical Grammar of the International Language (Kellerman Reed), paper .... .50
Esperanto Teacher (Fryer) ........ .20
Esperanto at a Glance (Privat) ...... .15
Primer of Esperanto (O'Connor) .10
Introduction to Esperanto (Baker) ...... .05
English-Esperanto Pocket Dictionary (Harris) .25
Edinburgh English-Esperanto and Esperanto-English Dictionary ........ .50
Handy Pocket Voocabulary (O'Connor) .10
Fundamento de Esperanto (Zamenhof) .. .50
In cloth ........ .75
Ekzercoj de Aplikado (Beaufort) ...... .30
Tra la Jaro (all in Esperanto) (Waddy) cloth ........ .50
Universala Vortaro (Esperanto-Esperanta-Franca (Boirac), 2 vols. and supplement .50

### LITERATURE

Cindrulino (Dumas) Stanyan ........ .15
Karlo, Privat ........ .15
Kolomba Premio (Dumas) Papot ...... .10
Mallonga Biografio de Henry Fawcett (Holt) Weems, art paper ........ .25
The New Testament in Esperanto art cloth binding, gilt edges ........ .45
Patroj kaj Filoj (Turgenev) Kabe ...... .65
Pola Antologio, Kabe ........ .50
Princo Serebrjanij (Tolstoi) ........ .75
Princo Vanc' (Bates) Harris ........ .35
cloth, gold-stamped ........ .75
Rakonto kaj Aventuro, Hall & Barroll .. .10
Robinsono Kruso (Defoe) Mason, boards .50
Sep Ridoj (Wendell) ........ .25
Sub la Meznokta Suno (Wendell) ...... .25
Tradukoj Tri (Helliwell) Helliwell ...... .20
La Virineto de la Maro (Andersen) Zamenhof ........ .35
Dua Kreanto, Sanjurjo ........ .05
Elektitaj Fabloj (la Fontaine), Vallant .. .15
Eneido (Virgil), Vallienne ........ .80
Patrino Anserino, Stoner ........ .15
Tra l'Silento Privat, parchment ........ .40
Verdaj Fajreroj, Frenkel ........ .20

### COMEDY AND DRAMA

Don Juan (Moliere) Boirac ........ .40
Frenezo, Pujula ........ .30
Galateo (von Suppe), Shafer........ .25
Ginevra (Privat) ........ .25
Kiel Plaĉas al Vi (Shakespeare), Kellerman, art binding ........ .25
Mistero de Doloro (Gaul), Pujula........ .50
Misteroj de Amo, Kolovrat ........ .30
La Nevo kiel Onklo (Schiller), Stewart .30
La Rompantoj, Pujula ........ .25

### MISCELLANEOUS

Aĉo, card game ........ .50
Gvidlibro tra San Francisko ........ .05
Kondukanto al la Stacia Pilkludo (Spaulding), Erik ........ .10
Mia Nuna Sintenado pri Apendicito (Morris), Besemer ........ .10
Vidindaĵoj de Bostono ........ .15

### PROPAGANDA

Amerika Esperantisto, in lots of 5 or more, per copy, ........ .05
Esperanto Keys, each ........ .02
20 for ........ .25
100 for ........ 1.00
Foreign Esperanto Magazines, 6 different .40
Peace Stamps of E. A. N. A., 24 for .... .15
144 for ........ .60
288 for ........ 1.00
"E" Button or Brooch Pin, green enamel star with gold plated back—letter "E" in gold ........ .35
E. A. N. A. Button ........ .05

The following are in stock when this list is printed, but supplies are very uncertain and in many cases when the present stock is sold we shall be unable to obtain more. It would be well, therefore, in ordering any of these, to specify second choice.

### PROSE

Adele Kamm ........ .70
Aladin aŭ la Mirinda Lampo ........ .20
Aline ........ .50
La Bruna Lilio ........ .06
Brazilio ........ .40
Bukedo ........ .50
La Devo ........ .10
Eliro ........ .60
La Faraono, 3 vols, each ........ .70
Genezo ........ .60
Historio de Esperanta Movado en Saratov .10
Karmen ........ .35
Kondukanto kaj Antologio ........ .50
Laŭroj ........ .50
Levidoj ........ .50
Mirinda Amo ........ .75
Nova Sento ........ .60
La Predikanto ........ .25
Propaganda Piedvojaĝo al la 8a Internacia Kongreso ........ .25
Sentencoj de Salomono ........ .40

COMEDY AND DRAMA

Angla Lingvo sen Profesoro .......... .30
Aspazio .......... .60
Cikado ĉe Formikoj .......... .20
Georgo Dandin .......... .35
Halka .......... .30
Hamleto .......... .55
Ifgenio en Taŭrido .......... .55
Jolanto .......... .45
Kaatje .......... .75
Makbeto .......... .55
La Rabistoj .......... .55
Ŝi Kliniĝas por Venki .......... .30
La Ventego .......... .50

MISCELLANEOUS

Poliglota Vade Mecum de Internacia Farmacio .......... 2.50

## Be Sure to Come to

# PHILADELPHIA, JULY 26, 27, 28, 29, 1917

## and attend the TENTH ANNUAL CONGRESS of the ESPERANTO ASSOCIATION of NORTH AMERICA

These are the days when the world's need of a neutral International Language is most evident and when Esperanto can be pushed to the attention of thoughtful people. After these days of conflict,—soon to close, let us hope—the peoples of this war-torn earth will, nay MUST, give ear to plans for world-unification. This is the golden opportunity for the Esperantist. If you believe Esperanto to be an important help toward Universal Brotherhood join with us in making the TENTH ANNUAL the "best ever"!

A varied and interesting program is being prepared and the CONGRESS TICKET, price THREE DOLLARS, admits to everything.

Watch for our Second Notice giving some of these events.

**RESERVE THE ABOVE DATES ! !**

On behalf of the Local Committee,

**J. FRED KNOWLAN, Chairman**

April 14, 1917. 45 N. 13th St., Philadelphia.



# KIAL MI SCIAS KE LA MORTINTOJ REVENAS

**By W. T. STEAD**

Leading English Esperantist, Editor and Benefactor

An intensely interesting work on Psychic Science, replete with the author's personal experiences. Terse and vivid.

Esperantized by F. M. Goodhue and edited by competent authority.

PRICE, 45 CENTS, Post Free

(English edition costs 75 cents)

Address all orders to the translator, care of

**BOSTON ESPERANTIST SOCIETY, PIERCE BLDG., COPLEY SQ., BOSTON**

# Amerika Esperantisto

## American Esperantist

Entered as second-class matter May 15, 1913, at the Postoffice at West Newton Station, Boston, Mass., under the Act of March 3, 1879.

Published Monthly by

THE AMERICAN ESPERANTIST COMPANY (Inc.)

WEST NEWTON, MASS.

ONE DOLLAR A YEAR    Eksterlande $1.25 (Sm. 2.50)    SINGLE COPY TEN CENTS

Mallongaj verkoj, tradukajoj kaj novajoj ĉiam prefere akceptitaj. **Oni ne resendas** neakceptitajn manuskriptojn, se la sendinto ne kune sendis la resendpagon. La Redakcio konservas por si la rajton korekti manuskriptojn laŭbezone.

Oni donos la preferon al manuskriptoj skribitaj skribmaŝine.

VOL. 20    MARCH, 1917    No. 2

### THE PHILADELPHIA CONGRESS

American Esperantists, and in fact those of us the world over, note with encouragement and pleasure the announcement of the TENTH Annual Convention of our Association in Philadelphia. In the year 1917 few will be the national Esperanto congresses for the distressing reason so familiar to all of us, while again our international meeting must be postponed. Proud and happy should be the Esperantists of North America that they will be able to again meet in convention assembled, renew their pledges of loyalty to the cause, reiterate their belief in the ultimate success of the secondary language, and gain inspiration from their fellow-thinkers from other parts of the country.

Philadelphia is a happy choice on the part of the Central Office and the cordial original invitation of the Philadelphia Esperanto Society foretells an enthusiastic meeting. New England, the Pennsylvania Division, the New York groups and the Capital Division need no word from us as to their duty July 26, 27, 28 and 29 as we feel confident a complete representation will be present from these districts. Michigan of the Central Division has never failed us yet, and we may expect even more from them this year. Illinois, the Ohio Valley, the Middle and Far West and the Southern, may have a large part in contributing to the success of the 10th. From these sections we hope to find at least a few representatives in person. Do not disappoint the local committee, which following the example of all "local committees" before it, is even now working faithfully on the vast number of details connected with such a meeting.

A Congress ticket at $3.00, admitting to everything is so extremely reasonable in these days of the H. C. of L. that every member of E. A. N. A. should feel it a solemn duty to become a Congress Member, even if he is so unfortunate as to be unable to attend the convention.

**Philadelphia**—our City of Brotherly Love,—an ideal congress city for our organization of idealists, an organization which, developing the practical possibilities of the International Tongue, also keeps before it the belief that Esperanto likewise points the way to inter-racial amity and

universal peace. Let us not miss this splendid opportunity of boosting our cause, and be present at Philadelphia in July.

Lest you forget,—the Chairman of the Local Committee is Mr. J. Fred Knowlan, 45 N. 13th St., Philadelphia, Pa.

---

### A SKETCH ON CUBA

**By an American Esperantist**

The island of Cuba, oftimes called "The Pearl of the Antilles," is indeed well named, for it is the largest and most picturesque of the lovely islands in the Caribbean Sea, formerly known as the "Spanish Main." From the time of its discovery by the famous navigator Christopher Columbus in 1492, until the treaty of peace between the United States and Spain in 1898, which gave the island into our keeping, Cuba was the storm centre of strife between those nations jealous of the riches which were to be won from the natives of the island; of combats between the various inhabitants of the island and the desperate buccaneers, who for a long time preyed upon the commerce and settlements; and of the bloody revolutions waged by the liberty-loving sons of Cuba.

During the last frantic effort of the Cubans to gain independence, the island was the scene of so much bloodshed and disorder of all kinds, that the eyes of the whole civilized world were focused upon it. The kind heart of good, old Uncle Sam could not tolerate this condition to exist for long, and so the United States sent her brave sons to help the Cubans gain their freedom. The events of the brief war which followed are still fresh in our minds. Our soldiers and sailors proved themselves heroes to a man and were soon owners of the island by conquest. Later, Uncle Sam showed the world his generosity when he granted the island its independence.

Nature must have been in her most artistic mood when shaping the island, for there is certainly no land beneath the skies which was given a more perfect combination of mountains and rivers, forests and plains. Nowhere under the sun may be found a more salubrious climate, grander mountain scenery, more charming valleys, more picturseque ruins and more fertile fields than Cuba offers. The temperature of the lowlands is that of the torrid zone, while the high interior of the island enjoys a delightfully temperate climate, and the verdure-clad hills, with the graceful palm and cocoanut trees clear against the pure, blue sky, may be seen at all seasons of the year.

Havana, the metropolis of the island, is a most unique city in that it contains a wonderful blending of the mediaeval with the modern in all things. The architecture is distinctly Spanish, yet occasionally homes and buildings patterned after American ideas are to be seen. Morro Castle is a superb example of the Spanish fortress of olden times, with its frowning walls built upon high land that gave it an impregnable position against assault in former years. Most of Havana's buildings are very massive and ornate, while beautiful plazas in front of many of them add attractiveness to the scene.

The cosmopolitan character of the people of Havana lends an air of interest to the traveler, for here are to be seen accurate types of all races. The native Cuban, a product of Spanish and Indian, is most picturesque, with his dusky skin and flashing eyes giving a clear impression of the passionate and romantic spirit of the Sons of the Southland. The other inhabitants of the island, with their characteristic dress and mannerisms, add a touch of human interest to the various parts of the city where they are wont to saunter, painting the streets with the gorgeous colors of their loose-flowing robes. A street scene in Havana is a veritable rainbow of lovely colors and startling contrasts so dear to the heart of an artist.

Education is not neglected here, and as a consequence Esperanto is spoken by many of the wide-awake citizens. The headquarters of the Cuba Esperantisto is in a beautiful building and the generous hospitality of its staff is most pleasing to the tired traveler. The Esperantist enthusiasts here realize as we all do, that by proper co-operation we shall make our language the world tongue

in good time, and that this success of Esperanto will prove one of the greatest boons to mankind, as it will do much to promote universal peace and toward bringing that Utopia to earth—the Brotherhood of Man.

Leon Wallace.

---

## DUA KOMUNA LINGVO

Je kia mirinda facileco, ĉiuj homoj nepre sukcesus ĉie, spite de la multeco de iliaj lingvoj, sin ĉiujn reciproke kompreni, sen interpretistoj, se ĉie ili konsentus ĉiuj lerni kaj uzi, por interparoli kun la alilandanoj, nur unu duan lingvon, saman por ĉiuj: Esperanto, tiom admirinda je simpleco kaj logikeco.

Por tiom pli bone komprenigi de ĉiuj, kaj montri al ĉiuj kian fortegan ligilon naskus inter ĉiuj homoj, kaj ĉefe inter la Liganoj la alpreno de tiu dua komuna lingvo, kaj kia oportuneco rezultus de ĝi por ĉiuj, precipe laŭ komerca vidpunkto, ni estas rajtigita de la Beauvais'a (Oise) Esperantista Grupo (Francujo) uzi en nia lando la kaŭĉukan stampilon, kaj saman tipografian kliŝajon, kreitajn de tiu grupo, por esti metataj sur la kovertojn, leterkaplokojn, kaj unuvorte sur ĉiujn presaĵojn, kaj kies jen la teksto kaj la formo:

> **Por korespondi kaj vojaĝi en la fremdajn landojn, ni lernu ĉiuj Esperanton, tiom simplan kaj tiom facilan, kaj kiu jam permesas al miloj el ni, sin reciproke kompreni sen interpretistoj, kun la multaj alilandanoj, kiuj, en ĉiuj landoj, ankaŭ jam flue parolas ĝin.**

Tiuj do el niaj samlandanoj, kiuj estus pretaj, por helpi la Beauvais'an Esperantistan Grupon, en ĝia civilizaciiga kaj progresiga ellaborajo uzi tiun kaŭĉukan stampilon aŭ tipografian kliŝajon, povas sin turni al ni, ĉe tiu adreso:

Esperantista Grupo
Beauvais (Oise), Francujo.

Ni volonte donos al ili ĉiujn necesajn informojn.

---

## KIU ALVENAS?

Mi estas pli potenca ol la kunigitaj armeoj de la mondo.

Mi detruas pli multajn homojn ol ĉiuj militadoj de la mondo.

Mi estas pli mortiga ol kugloj, kaj mi ruinigas pli multajn hejmojn ol la plej gigantaj sieĝaj kanonoj.

Mi ŝtelas en Usono sola pli multe ol tri cent milionojn da dolaroj ĉiujare.

Mi neniam indulgas, kaj mi trovas miajn viktimulojn inter la riĉaj kaj la malriĉaj egale, la junaj kaj la maljunaj, la fortaj kaj la malfortaj; vidvinoj kaj orfoj min konas.

Mi estas tiel granda ke mi povas ombri ĉiujn specojn de laboro, de la uzado de akrigilo ĝis la direktado de ĉiu fervoja vagonaro.

Mi buĉas milionojn da salajruloj ĉiujare.

Mi embuskas en nevidítaj lokoj, kaj mi laboras silente.

Oni vin avertas, sed vi ne atentas.

Mi estas senkompatega, mi estas ĉie; en la hejmo, sur la strato; en la fabrikejo, ĉe la kruciĝoj de la fervojoj kaj sur la maro.

Mi alportas malsanecon, degradon kaj morton, kaj tamen nemultaj penas min eviti.

Mi detruas, premegas, kripligas, prenas ĉion, donas nenion.

Mi estas via plej malbona malamiko.

Mia nomo estas
Malzorgemeco.

Tradukis
E. S. Payson.

**THE ADVANCE SHEET**

**A Quarterly, published and edited by Julia Goldzier, 26 E. 45th St., Bayonne, N. J., U. S. A.**

**Price 50 cts. a year; $1.00 for 3 years.**

In the interest of Religious and Political Advancement, Orthographical Reform and

**ESPERANTO SHORT-WRITING**

La gazeto enhavas gravan departamenton pri la **Esperanta Mallong-Skribo.** Nova serio komenciĝos en la Somera Eldono. Iu povas eklerni Esperanton kaj ankaŭ la Mallong-Skribon per tiu Eldono; kaj iu povas daŭrigi kaj pli bone lerni tiujn ĉi du temojn se oni jam komencis la studadon.

Demandu specimenan ekzempleron.

**MONOGRAM-PRESILO**

**Oportuna, kompakta, distingiĝa, neta, ĉiamdaŭra. Ideala donaco por ia okazo.. Unu aŭ du Ĉefliteroj—25 cendoj.**

**Leahy's, Bx. 264, Alexandria, Va.**

**MIGRANTAJ KARTOJ ! ! !**

**6 FOR 10 cts. 25 FOR 25 cts.**

**E. H. BECKER**

**332 Third Ave., Dayton, Ky.**

# LA LEGENDO DE DORMA KAVO

De Washington Irving

Tradukita de Herbert M. Scott

(Daŭrigo)

Ĉirkaŭ ducent metrojn de la arbo, malgranda rivereto krucis la vojon kaj fluis en ŝliman, denskreskaĵan valeton, konitan kiel *Wiley's Marĉo. Kelke da krudaj ŝtipoj, metitaj flanko ĉe flanko, servis kiel ponto trans la fluaĵo. Tiurande de l' vojo, kie la rivereto eniris la boskon, grupo da kverkoj kaj kaŝtanarboj, interplektitaj dense kun sovaĝaj vinberujoj, jetis kavernan ombron super ĝin. Pasi tiun ponton, estis la tasko plej severa. Ĉe tiu identa loko kaptiĝis la malfeliĉa André, kaj sub kovro de tiuj kaŝtanarboj kaj vinberujoj sin kaŝis la fortikaj kamparanoj, kiuj surprizis lin. Jam de tiu tempo oni konsideris la fluaĵon obsedata.

Alproksimiĝante al la fluaĵo, lia koro komencis bategi; li kolektis tamen sian tutan kuraĝon, faris al la ĉevalo dekon da piedfrapoj ĉe la ripojn kaj penis ekgalopi vigle trans la ponton; sed anstataŭ ekiri antaŭen, la obstina maljuna besto movis sin **flanken** kaj trafis per sia tuta larĝo la vojbarilon. Iĥabod, kies timoj kreskis kun la prokrasto, tiregis la kondukilojn de l'alia latero, bategante per la kontraŭa piedo; tute vane; la ĉevalo ekiris ja, sed nur por jeti sin sur la duan flankon de la vojo, en dikaĵon el rubusoj kaj frangoloj. La lernejestro nun regalis per kaj vipo kaj kalkanoj la malsatulajn ripojn de maljuna Pulvo, kiu eksaltis antaŭen, spirblovaĉante, sed haltis tuj apud la ponto, kun sibiteco, kiu apenaŭ ne pafis la rajdanton super lian kapon. Ĝuste tiam ia plaŭda paŝo flanke de la ponto atingis la streĉitan orelon de Iĥabod. En la malluma ombro de la bosko, sur bordo de la rivereto, li vidis ion egan, malnorman, nigran, kolosan. Ĝi staris senmove, sed ŝajnis kuntirita en la ombro, kvazaŭ ia titana monstro, falonta sur la vojaĝanton.

La haroj de la terurita pedagogo disstaris sur la kapo. Kion fari? Sin turni kaj forkuri, estis jam tro malfrue; çetere, kia ŝanco, kureviti fantomon aŭ koboldon, se tio ĝi estas, kiu povus veturi per la flugiloj de vento? Afektante la kuraĝon, li postulis en balbutaj paroloj: "Kiu vi estas?" Li respondon ne ricevis. Li ripetis la postulon en voĉo ankoraŭ pli emocia. Ankoraŭ nenia rediro. Li denove pluvbatis la flankojn de la neregebla Pulvo kaj, ferminte la okulojn, ekkantis kun senvola fervoro psalman arion. Tiam la ombreca timataĵo ekmovis sin kaj post rampado kaj salto staris tuj meze de l' vojo. Kvankam la nokto estis malluma kaj funebra, tamen la formo de l' nekonato estis nun en kelka grado konstatebla. Li ŝajnis rajdanto de grandaj dimensioj, kiu sidas sur nigra ĉevalo potenckorpa. Li provis nek ataki nek amiki, sed tenis sin for sur unu flanko de la vojo, kunpasadante kun la blinda parto de maljuna Pulvo, kiu jam perdis sian timon kaj malobeemon.

Iĥabod, kiu tute ne ŝatis sian strangan noktomezan kolegon, kaj ekpensis pri la aventuro de Brom Bones kaj la galopulo-Hesano, nun rapidigis sian ĉevalon, esperante postlasi lin. Sed la fremdulo rapidigis sian beston egalgrade. Iĥabod, tirante la kondukilojn, malakcelis la iron ĝis paŝado, en la celo malantaŭiĝi—la alia faris same. Lia koro komencis sveni; li klopodis daŭrigi sian psalmokantadon, sed lia seka lango algluiĝis al la palato kaj li ne povis sonigi eĉ unu verson. Kuŝis en la malafabla, eterna silento de ĉi tiu persista kunulo io mistera kaj minaca. La afero baldaŭ ricevis klarigon teruran. Surirante altan teron, kiu reliefiĝis kontraŭ la ĉielo la figuron de lia kunrajdanto, gigante altan kaj envolvitan en palton, Iĥabod konsterniĝis, ekvidante, ke ĝi estas senkapa! kaj lia konsterno ankoraŭ kreskis, kiam li observis, ke la kapo, kiu devus sidi apud la ŝultroj, portiĝas antaŭ li sur la selbutono! Lia timego fariĝis freneza; kaj li pluvigis pied- kaj vipo-batojn sur Pulvon, esperante, per subita mo-

*Elparolu Ŭajliz.

vo trompeviti la kunulon—sed la fantomo ekiris samtakte kun li. Jen do ili kuregas senbride; kun ŝtonoj dancantaj, fajreroj ekbrilantaj ĉe ĉiu salto. La maldikaj vestoj de Ihabod flirtis en la aero, dum li streĉis la longan stangan korpon eĉ preter la ĉevalan korpon, en la avideco de sia flugo.

Ili jam atingis la vojon, kiu deflankiĝas al Dorma Kavo; sed Pulvo, ŝajne obsedata de diablo, anstataŭ iri per tie, faris turnon en la direkto kontraŭa kaj ĵetis sin furioze valen maldekstren. Ĉi tiu vojo kondukas tra sabla kavo, ombrata de arboj por ĉirkaŭ duon-kilometro, kie ĝi transiras la ponton faman en la rakontoj pri koboldoj; kaj preter tio aperas la verda altaĵeto, sur kiu staras la kalkita preĝejo.

Ĝis nun la paniko de la ĉevalo donis al ĝia mallerta rajdanto ŝajnan superecon en la kurado; sed ĝuste kiam li duone trapasis la kavon, la ventrozonoj de l' selo krevis kaj li sentis, kiel ĉi tio glitas de sub li. Li kaptis ĝin je la butono kaj penis teni firma, sed vane; kaj apenaŭ povis savi sin, ĉirkaŭprenante la kolon de maljuna Pulvo, kiam la selo falis teren kaj li aŭdis ĝin, subpaŝatan de lia persekutanto. Dum unu momento teruro por la kolerego da Hans Van Ripper trafulmis lian menson—ĉar ĝi estis la festa selo de tiu moŝto; sed nun ne tempo por timoj bagatelaj: la koboldo premsekvas lin; kaj (ho, mallerta rajdanto!) li devas multe klopodi, por resti sidanta; kaj glitas jen unu flankon, jen duan, aŭ jen tangas sur la alta pinto de spino de sia besto kun fortego, kiu, li timas, vere disfendos lin.

Maldensiĝo en la arboj vigligis lin de espero, ke la preĝeja ponto estas apude. Ŝanceliĝa rebrilo de arĝenta stelo ĉe l' koro de la rivereto sciigis lin, ke li ne eraras. Li vidis la murojn de l' preĝejo dube montriĝi sub la arboj pretere. Li rememoris la lokon, kie la fantoma konkurinto de Brom Bones malaperis. "Se mi nur povos atingi tiun ponton," pensis Ihabod, "mi estos savita." Ĝuste tiam li aŭdis la nigran ĉevalegon, spirblovantan tuj malantaŭ li; li eĉ imagis senti lian brulan buŝvaporon. Ankoraŭ unu spasma piedbato ĉe la ripojn, kaj maljuna Pulvo saltis sur la ponton; li tondris trans la sonorajn tabulojn; li atingis la kontraŭan bordon, kaj nun Ihabod ekrigardis post sin, por konstati, ĉu la persekutanto ne malaperos, laŭregule, en ekflamo da fajro kaj sulfuro. Ĝuste tiam li vidis la koboldon, sin levantan sur la piedingoj kaj (ho terure!) **pafĵetantan sur lin sian kapon.** Ihabod penis eviti la abomenan ĵetaĵon, sed tro malfrue. Ĝi trafis lian kranion kun infera krako—li rulfalis la kapo malsupren en la polvon, kaj Pulvo, la nigra ĉevalego kaj la kobolda rajdanto preterflugis urugane.

* * *

La morgaŭan matenon oni trovis la maljunan ĉevalon sen selo kaj kun brido sub la piedoj, kviete pinĉantan herbon antaŭ la pordego de sia mastro. Ihabod ne aperis por matenmanĝi—venis la horo de tagmanĝo, sed ne Ihabod. La knaboj kunvenis ĉe la lernejo kaj promenis senokupe sur la bordo de l' rivereto; sed ne montriĝis lernejestro. Hans Van Ripper nun sentis iom da maltrankvilo pri la sorto de kompatinda Ihabod kaj de sia selo. Oni faris enketon, kaj post zorga esplorado oni trafis liajn postesignojn. En unu parto de la vojo al la preĝejo oni trovis la selon, subpaŝitan en la polvon; signojn de ĉevalhufoj, profunde enstampitaj en la vojon kaj evidente en furioza rapideco, oni konstatis ĝis la ponto, preter kiu, sur bordo de larĝa parto de l' rivereto, kie la akvo fluas profunde kaj nigre, oni trovis la ĉapelon de l' malfeliĉa Ihabod, kaj tuj apud ĝi frakasitan kukurbon.

Oni traserĉis la rivereton, sed la korpo de la lernejestro estis ne malkaŝebla. La mistera okazintaĵo naskis multe da diskutado ĉe la preĝejo la sekvintan dimanĉon. Grupoj da rigardantoj kaj babilantoj kolektiĝis en la preĝeja korto kaj ĉe la loko, kie la ĉapelo kaj kukurbo estis trovitaj. La rakontojn de Brouwer, de Bones kaj sufiĉan nombron da aliaj oni rememorigis, kaj ilin ĉiujn konsiderinte kaj komparinte kun la simptomoj de la jusa okazo, oni skuis la kapojn kaj venis al la konkludo, ke Ihabod forportiĝis de la galopulo-Hesano.

Tial ke li estis fraŭlo, kaj al neniu ŝuldis, neniu sin ĝenis pri li plu; la lernejon oni translokis en alian parton de la Kavo kaj alia pedagogo regis anstataŭ li.

Estas vero, ke maljuna agronomo,

vizitinta Nov-Jorkon post kelkaj jaroj, —de kiu ja mi ricevis ĉi supran tutan fantomrakonton, kunportis hejmen la famon, ke Iħabod Gruo ankoraŭ vivas; ke li estis forlasinta la najbaraĵon parte el timo antaŭ la koboldo kaj Hans Van Ripper, parte el honto, ĉar li subite forpuŝiĝis de la heredontino; ke li translokiĝis en malproksiman distrikton de la lando; instruadis kaj studis leĝosciencon samtempe; fariĝis advokato; praktikis politikon; verkis por jurnaloj; kaj fine estis difinita Juĝisto de la (9) **"Ten Pound Court."** Pri Brom Bones, kiu baldaŭ post malapero de sia rivalo, kondukis la florantan Katrinon triumfe al edziĝa altaro, oni observis, ke li aspektas treege scianta, kiam ajn oni rakontas la historion de Iħabod, kaj ĉiam ekridegas ĉe aludo al la kukurbo; kio suspektetigis, ke li scias pli multe pri la afero, ol li volas elbabili.

Tamen la maljunaj kamparaninoj, kiuj juĝas la plej bone pri tiaj aferoj, kredigas ĝis hodiaŭ, ke Iħabod forrabiĝis per rimedoj supernaturaj; kaj ĝi estas ŝatata historio, ofte rakontata en tiu regiono ĉirkaŭ vintrovespera fajro. La ponto fariĝis pli ol iam objekto de superstiĉa timo; kaj jen eble kial la vojo estas ŝanĝita lastatempe, per alkonduki al la preĝejo laŭborde de la muelejo lageto. La lernodomo, forlasita, ruiniĝis baldaŭ, kaj oni raportis, ke ĝi estas obsedata de la fantomo de l' malfeliĉa pedagogo; kaj plugoknabo, malrapidante hejmen en silentaj somervesperoj, figuris al si ofte lian voĉon malproksime, kiu kvazaŭ kantas melankolian psalmarion inter la trankvilaj solejoj de Dorma Kavo.

---

El "La Skizlibro" de Washington Irving tradukis (en formo iom mallongigita) Herbert M. Scott.

---

## NOTOJ
### kiujn rilatas la ciferoj, enmetitaj en la tekston

1. Elparolu **tari taŭn** (=angle "prokrasto-urbo"): "Per tiu nomo ĝin baptis, oni diras, en pasinta tempo, la bonaj mastrinoj de la ĉirkaŭa kamparo, pro la kronika emo de siaj edzoj, prokrasti ĉe la vilaĝa drinkejo en foiraj tagoj."—La Aŭtoro.
2. Servis en la brita armeo dum la Usona Revolucio multaj dung-regimentoj el la germana ŝtato Heso (Hesse), tiam sub regado de la angla reĝo. Tiujn ĉi fremdajn soldatojn la Kolonianoj aparte malamis.
3. La unua eldono de "La Skizlibro" eliris en 1819.
4. Elparolu **hŭip-pur-ŭil** (tiel nomata imite de sia krio): Amerika birdo (**Antrostomus vociferus**), aŭdata nur nokte.
5. Angle **martin** aŭ **marten,** france **martin,** germane **Mauerschwalbe:** speco de hirundo (**Progne subis** aŭ **purpurea**).
6. Elparolu **kaŭ-bojz** (laŭvorte "bovin-paŝtistoj"): rabistoj, kiuj dum la Usona Revolucio abundis sur la neŭtrala tero inter la Usona kaj brita tendaroj kaj ĉirkaŭŝtelis la Amerikanojn.
7. Majoro John André estis dum la Revolucio angla spiono, kiu peris en traktadoj inter perfida Usona generalo kaj la brita armeo. Li kaptiĝis prokime de Tarry Town de tri milicianoj, parto de esplortaĉmento, kiuj lin suspektis. En proceso antaŭ juĝantaro el dek kvar oficiroj li konfesis siajn agadojn. Oni do kondamnis lin laŭ la militaj leĝoj kaj li estis pendigita. Junulo 29-jara, Majoro André estis en efektiveco viro aparte kapabla kaj altkaraktera, kiu, ĉar en siaj spionajoj li nur obeis sian estraron kaj agis laŭ sia devosento, estis tre estimata, tiel de siaj kontraŭuloj, kiel de siaj amikoj. Oni faris fortajn klopodojn, por ke li estu ne ekzekutata, kaj la Usona ĉefgeneralo Washington estis iom riproĉata, ĉar li permesis lian mortigon.
8. Amerika arbo (**liriodendron tulipifera**), kiu portas tulipsimilajn florojn.
9. Elparolu **ten paŭnd kort:** ia malsupera instanco.

---

One of our members has written to this office to volunteer her services to the U. S. Government without compensation as an interpreter of German or Esperanto.

It occurs to us that if those of our members who speak foreign tongues which by any possibility could be of use, it would be a good idea to write to this office a similar offer, which will be placed on file and it might well be that in this way our members could be of great service to the Government and at the same time bring Esperanto and the spirit of Esperantism to the attention of those in authority more effectively than in any other way.

Any such offers will be at once brought to the attention of the War Department by the Secretary.

# FOR THE BEGINNER

## Edited by Herbert M. Scott

Our readers are invited to send us any difficulties encountered in their study of the international language, inquiries being answered promptly and completely in this department of the magazine.

### VORTOJ KUN FALSAJ ANALOGOJ
(Daŭrigo)

La **fatala** tago alportis al li mortigan vundon.

La fatala malsano ne mortigis, sed lasis min kriplulo.

Je la masto estis la kluba **flago,** je la postparto la nacia standardo.

La fontano ricevas sian akvon el **fonto.**

**Frazo** konsistas el unu aŭ kelkaj vortgrupoj.

En la **fumo** mi eksentis haladzon de pulvo.

La enteriga soleno daŭris nur unu horon, sed la **funebro** daŭris monaton.

La **galono** de l' artileria uniformo estas ruĝa.

Mi volonte **glados** al vi la tolajon.

**Glasoj** estas farataj el vitro.

Apud la granita palaco staris ĝardeno el granatoj.

La domo estas **granda,** sed tute ne grandioza.

Dum la patro regis, la filo estis **guvernata.**

Li estas tiel milda kiel **ĝentila.**

Via faro ne estas **ĝuste** justa.

Mi iris rekte de la ĉambrego **al la halo.**

Metalo **hardita** estas ne pli malmola ol la ordinara, sed ĝi estas pli fortika.

Mi amas veturi sur omnibusa **imperialo.**

Li ne **indulgis** tiujn, kiuj aldonis sin al malvirtoj.

Li estas veterano de l' armeo, **invalido,** sed ne malsanulo.

La **ĵurnaloj** kaj la revuoj ambaŭ estas gazetoj.

La tendaro estis metita en granda **kampo.**

Ne havante bombonojn, ni manĝis la **kandon** de la gelateno.

The fateful day brought him a mortal wound.

The ill-appointed disease was not fatal, but left me a cripple.

At the mast was the club pennant, at the stern the national flag.

The fountain draws its water from a spring.

A sentence is made up of one or more phrases.

In the smoke I detected the fumes of gunpowder.

The funeral lasted but an hour, but the mourning lasted a month.

The facings of the artillery uniforms are red.

I'll be glad to iron your linen.

Tumblers are made of glass.

Beside the granite palace lay an orchard of pomegranates.

The house is large but by no means grand.

While the father governed, the son was under a tutor.

He is as gentle as he is polite.

Your deed is not exactly just.

I went straight from the hall to the market-house.

Tempered metal is no harder than the ordinary kind, but it is stronger.

I like to ride on the top of an omnibus.

He would not spare those who indulged in vice.

He is a veteran of the army, discharged for incapacity, but not an invalid.

Newspapers and magazines are both periodicals.

The camp was pitched in a large field.

Having no made candy, we ate the candy off the jelly.

**SUBSTANTIVO**
**(Daŭrigo)**

"Kazoj ekzistas nur du: nominativo kaj akuzativo (objective); la lasta estas ricevata el la nominativo per la aldono de la finiĝo **n.**"—P. G. rule 2.

The **subject** of a sentence, being primary, stands alone and uninflected (**en nominativo**). All other nouns (with the three exceptions noted below) must be attached to the sentence by a link showing the relationship. This link is normally a preposition, each preposition covering a different kind of relationship (as **de** "possession," al "direction towards," per "means," etc.). But the general subordinate relation covered by the indefinite preposition **je** is usually taken up by the ending **n,—which is its exact equivalent** (see rule 14). In fact if we are in doubt as to whether a given verb is "followed" by a preposition or the objective case, it is always safe to use the objective.

Exception 1. Of course all nouns in apposition to the subject are in the same case as the subject.

Exception 2. **Esti, ŝajni** and (**far**)**iĝi** are virtually the only verbs that "take the same case after them as before them,"—with which, in other words, the ending **n** is never associated.

Exception 3. In a sentence like "Oni faris la homon reĝo," where there is a double object, **n** is used (as being practically sufficient) on the first one only.

---

# "Lest We Forget"

## ARE YOU COMING?

Philadelphia, May 28, 1917.

To all in any way interested in the International Language:

The Esperanto Society in this city cordially invites you to participate in the

**Tenth Annual Congress of the Esperanto Association of North America**

(Place and Date)

........................1917.

Margaret A. Maisch, Secretary, Local Committee, Philadelphia.

Dear Miss Maisch:

Please note my support of the

*Tenth Congress of the Esperanto Association of North America*

as follows:

I will be present at the Congress, July 26-29, in Philadelphia.
Send me Congress Ticket , for payment enclosed.
Place me on the Guarantors List for a liability limited to
Dollars to cover a possible deficit.

Remarks:

(Signed) ................................................

(Address) ..........................................

..........................................

# DEZIRAS KORESPONDI

One insertion: 10 cents; four insertions: 25 cents. Announcement consists only of name and full address.

Unufoja anonco: 20 sd.; **kvarfoje 50 sd.** Anonco konsistas nur el nomo kaj plena adreso.

---

F-ino Maria Martin, 1102 W. Church St., Urbana, Illinois, Usono. Nur kun geiremduloj. 4

S-ro Jose Alvarez Garcia, Ave. 18 de Julio No. 1020, Montevideo, Uruguay. 3

M. Amiel, Box 1029, El Paso, Texas.

S-ro William J. Leahy, Box 55, Stonington, Conn., Usono. 3

Giles Edgar Kindley, Davidson, N. C., Usono. 3

S-ro Petro Babić, G.P.O., Auckland, New Zealand (Il. PK).

S-ro Jakov Vodanovič, G.P.O., Auckland, New Zealand, (Il. PK) 8

S-ro Fernand Lepercq, Soldato, 13a reg. Inf., Audeloncourt par Clesmont, Haute Marne, France. Ĉiam respondos.

S-ro N. Rudnicky, poŝtoficisto, Taŝkent Ie, (Russian Turkestan, Central Asia), pri vivo kaj laborkondiĉoj en Ameriko Ĉar leteroj ne estas ricevebl:j, skribu per PK.

S-ro Henriko Chantry, Tendaro 1, Barako 30, Zeist, Holland.

S-ro B. V. Dmitrevskij, Upravlenie Jug. Vost. J. de Voronej, Rusl. P. T., P. M., L., Cfl., ĉiam respondos.

S-ro P. Tobi, General Delivery, Los Angeles, Calif., Usono, deziras interŝanĝi P. M.

S-ro Francisco Sagrera, str. Unio 2, Palafrugell, Hispanujo.

S-ro Tomas Iglesias, str. Cervantes 13, 4, Manresa, Hispanujo.

S-ro Blanse Gaspard, barak 48, Harderwijk, Holando.

S-ro Fernand Lepercq, Soldato, 13a reg. Inf. Audelencourt par Clesmont, Haute Marne, Francujo.

S-ro Benecchio Alessandro, Correspondante Mondiole, Cassella Postale 19,636, Lugano, Svisujo.

S-ro Mario Bru, instruisto, Tivissa (Hispanujo) deziras nterŝanĝi ilustritajn P. K.

Ch. Autricque, Lycee, St. Omer (P. D. C.), Francujo. Ĉiam respondas.

Moskvo, Ruslando Novaja Basmannaja, d 10-12, kv 27-28. S-ro Leo Skazin dez. kores. P. I. kun vidajoj de riveroj, kanaloj kaj urboj. Markojn bildaflanke.

Moskvo, Ruslando, Lubjanskij pr. 3, Instituto de Esperanto, F-ino Treuman.

Astrahan, Ruslando, Armjanskij most, svoj dom S-ro Artemjev, P. I., L., P. M. Ĉiam respondas.

Voronej, Ruslando, I-a reala lernejo S-ro M. Podŝivalor dez. koresp. P. K. Il. Ĉiam respondas.

Grupo de gelernantoj deziras korespondi, interŝanĝi P. T., P. M., fotograf., ktp. Ĉiam tuj respondos. Odessa, Ruslando, Riŝelca gimnazio, S-ro Vozdvijenskij.

Eheo Neijens, brigadier 10 batterie de siege, Belga internigito, loĝejo 5, Harderwijk, Holando, deziras interŝanĝi il. P. K., Leterojn, jurnalojn, ktp., kun Amerikanaj samideanoj. Tuj kaj ĉiam respondos.

---


SHEET MUSIC
IN
ENGLISH & ESPERANTO
WITH KEY TO ESPERANTO

Evening and Morning
Torn From Each Other
Save the Boys
Peace Between Nations
The Home Place
The Santa Claus Ship
A Cruel War
America's Prayer for Peace
Too Precious To Lose
Lay Down Your Arms, Ye Nations
No Flowers For Me When I'm Gone
Save United States From Rum
United States of Europe
If 'Twas Your Boy or Mine

**Two Songs in One** **Each 15c postpaid**

**A. E. BEATTY, Cardington, O.**

**STRANGA IDILIO**

**ARLO BATES and HERBERT HARRIS**

**25c.**

On sale by British Esperanto Association, London and Herbert Harris, Hyde Park Hotel, Chicago.



Plezuroj kiuj neniam muljuniĝas venas al la hejmoj kie sin trovas

EMERSON-A

LUDIGILO FORTEPIANO

Havi Emerson-an signifas ke multe da ĝojaĵoj, amuzado, intereso kaj instruado estas haveblaj por ĉiu familiano, de la plej juna ĝis la plej maljuna, laŭvole.

---

Vendistoj en ĉefaj urboj kaj urbetoj

*Petu Katalogon*

EMERSON PIANO COMPANY

Boston, Mass.

(Fondita 1849)